**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Aŭtoro: Ryszard Rokicki

# TESTO 33

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Unu hako **␣v␣ rk ␣ ␣** ne faligas.

**2.** Ne por **l ␣ p ␣** estas supo.

**3.** Oni ankaŭ planas la konstruon de domego kun 95 etaĝoj, kiu **␣ ␣ nk ␣ i ␣ ␣** kiel la financa centro de Ŝanhajo.

**4.** Du meteologoj el la universitatoj de Arizono kaj Kolorado asertas, ke solvo pri la **␣ n ␣ gm ␣** de la Bermuda Triangulo verŝajne kuŝas en la ĉielo.

**5.** La esploroj estas ankoraŭ en **␣ ks ␣ ␣ r ␣ m ␣ n ␣ ␣** fazo, sed oni povas atendi praktikajn aplikojn en la venontaj jaroj.

**6.** En Alto Paraíso (Brazilo) en ĉeesto de la urbestro estis inaŭgurita **␣v␣ nu ␣** *Esperanto*.

**7.** La urbo enhavas amason da terasaj refreŝiĝejoj, kie oni povas agrable babili ĉe **␣ r ␣ ĉ ␣** da biero.

**8.** La ekosistemo konsistas precipe el malaltaj arboj kaj arbustoj, kiuj havas **m ␣ k ␣ n ␣ sm ␣ ␣ ␣** por superi la severan klimaton.

9.La soldatoj dum kelke da minutoj superŝutis la malamikojn per **␣ l ␣ mb ␣ ␣** kugloj kaj ŝtonoj.

**10.** La debato pri eksplicita referenco al religio en estonta EU-konstitucio **␣ ␣ rv ␣ r ␣** bolas almenaŭ ekde junio 200**2.**

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** En la sekva generacio falo atendas la anglan, proksimiĝas la venko de la hispana, eĉ en "la **f ␣ ŭ ␣ ␣** de la leono", tio estas en Usono mem!

**2.** Štrbské pleso estas monta lago en orienta Slovakio ĉe la ŝtata limo kun Pollando, kie eblas nun per subakvaj kameraoj observi la vivon de la tieaj fiŝoj – trutoj, **e ␣ ok ␣ ␣**, plotoj ktp.

**3.** Urbaj instancoj en Vilnius, ĉefurbo de Litovio, aĉetis 500 **b ␣ c ␣ kl ␣ ␣ ␣** kaj disponigis ilin al civitanoj, farbinte oranĝkolore.

**4.** Nia asocio kunlaboras kun privataj kuracistoj, ŝtataj hospitaloj kaj diversaj **ap ␣ t ␣ k ␣ ␣**.

**5.** Tie ĉi kaj tie oni vidis marĉojn, kovritajn de akvaj kreskaĵoj kaj arbetoj, inter kiuj amase flugis sovaĝaj anseroj, **an ␣ s ␣ ␣**, kolomboj, cikonioj, ibisoj kaj pelikanoj.

**6.** Nia Turisma Fondaĵo planas eldoni en Esperanto 2-3 **af** ␣ **ŝ** ␣ ␣ ␣, kvar kolorajn broŝurojn pri kvar ĉefaj regionoj de Litovio, 1-2 mapojn, eventuale ankoraŭ unu turisman broŝuron.

**7.** La ekzakta tempomezuro necesas por **p** ␣ ␣**v**␣ kelkajn asertojn de Einstein-a relativec-teorio.

**8.** Se Pinokjo, kies nazo ŝvelas post ĉiu mensogo, estus germana **p** ␣ **p** ␣, en Berlino nun regus nur longnazuloj.

**9.** Post tridek kvar jaroj de regado, mortis la faraono Mer-amen-Ramzes XII, li mortis, ĉar li **s** ␣ **p** ␣ **r** ␣ ␣ al la eterna patrujo, kaj la regadon de la tera ŝtato li deziris konfidi al pli junaj manoj.

**10.** Mi volus helpi krei **l** ␣ **st** ␣ ␣ de tradukoj de malgrandaj lingvoj al lingvoj aliaj pere de Esperanto.

### **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| |
|---|
| prokrast', struktur', lamen', rezist', fond', plen', kontrol', komplet', glad', rezerv'. |

**1.** Skani bildojn estas teda kaj temporaba, sed ne tre komplika tasko, ␣ ␣ ␣ **n** ␣ **m** ␣ **b** ␣ ␣ de ĉiu persono.

**2.** La plej ofta kaŭzo de mortoj estis grava akuta rena nesufiĉeco kaj la kulpaj mikroboj estis ␣ ␣ **z** ␣ ␣ ␣ ␣ **m** ␣ ␣ al la plej konataj antibiotikoj.

**3.** La programistoj raportis, ke la projekto ␣ ␣ ␣ ␣ **r** ␣ ␣ ␣ ␣ **ĝ** ␣ ␣ nur pro tio, ke la plurfaza retrorulo de la Informiksa datumbanko laŭŝajne ne ĉiam ĝuste funkcias.

**4.** Laŭ la traktato, Irano allasos inspektistojn de IAEA al ĉiuj instalaĵoj, tamen la ␣ ␣ ␣ ␣ **r** ␣ ␣ ␣ **s** ␣ ␣ ␣ antaŭe anoncu siajn vizitojn.

**5.** *La Ondo* estas financata de neniu asocio aŭ ␣ ␣ **n** ␣ ␣ **ĵ** ␣, ni eldonas ĝin nur dank' al la kolektitaj kotizoj.

**6.** Gladado estis farita per fera ␣ **l** ␣ ␣ ␣ **l** ␣ varmigita per arda karbo el la forno.

**7.** Pol Hauspie transprenis la librotenan oficejon de sia patro kaj ␣ ␣ **m** ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **g** ␣ ␣ ĝin projektante komputilajn programojn por librotenado.

**8.** La fondo de Sennacieca Asocio Tutmonda, en 1921, alportis **r**␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **r** ␣ **ĝ** ␣ ␣ de la laborista movado.

**9.** La homo bezonas ĉasi pro instinkta predemo; kiam ne plu estas ĉasaĵo, la homo bredas bestojn en ␣ ␣ **z** ␣ ␣ ␣ ␣ **j** ␣ ␣ por havi la plezuron pafi, kapti, fanfaroni.

**10.** La zinko kiel prilaborebla metalo iĝas fleksebla, ␣ ␣ **m** ␣ ␣ ␣ **g** ␣ ␣ **l** ␣ kaj rulpremebla jam je ĉirkaŭ 130 celsiaj gradoj.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** Mi ne kalkulis kompreneble flankajn elspezojn, ekzemple se ni iam vizitas la ___ aŭ koncerton, aŭ havas gastojn ĉe ni.

**a.** deficiton **b.** teatron **c.** albumon **d.** ĉerizon

**2.** Ĉiuj plenaĝaj loĝantoj de ambaŭ ___ havas la rajton de voĉdonado.

**a.** seksoj **b.** sekretarioj **c.** rangoj d ĉenoj

**3.** La lasta dimanĉo de la fasto (unu semajnon antaŭ ___ ) nomiĝas Palmodimanĉo.

**a.** Kritnasko **b.** Karesmo **c.** Pasko **d.** Pentekosto

**4.** La vizaĝo de la junulo blankis kiel ___, liaj okuloj estis fermitaj kaj se oni ne scius, ke li estas senkonscia, oni opinius, ke li dormas profunde.

**a.** kverko **b.** kreto **c.** saŭco **d.** cerbo

**5.** Ankaŭ en la gazetaro de tempo al tempo aperas peceto da beletro aŭ ___.

**a.** hufo **b.** tono **c.** ĉeko **d.** poezio

**6.** La Estraro de UEA taskis specialan oficejan ___ gvidi la procedon de elekto kaj dungo de nova ĝenerala direktoro.

**a.** orfon **b.** kalsonon **c.** ombrelon **d.** komisionon

**7.** Traktante pri vivo kaj morto, kulpo kaj elaĉeto, la verko ne preterlasas inciti la ___ de la leganto, kiun konvinki kaj kateni apartenas al la tekniko de la aŭtoro.

**a.** emociojn **b.** kandelojn **c.** revuojn **d.** ŝtofojn

**8.** Ĉar la Oziriso-faraono ne povas mem ___ sian surteran mastraĵon, li do ordonas zorgi pri ĝi al ni, nomarĥoj, kiuj devenas de lia sango.

**a.** baki **b.** penetri **c.** administri **d.** afranki

**9.** D-ro Vincent mem estis devigita de diversaj malfeliĉaj ___forlasi en la aĝo de 20 jaroj la kolegion kaj fariĝi Metodista predikisto.

**a.** paneoj **b.** minoj **c.** paŭzoj **d.** cirkonstancoj

**10.** Mi rimarkis ankaŭ, ke tiu vojo estis disigita de la tuta senfina areo malantaŭa per vico da egale kurbaj ___ interligitaj per metalbrilaj dratoj kun pikiloj.

**a.** esencoj **b.** fostoj **c.** operacioj **d.** fabrikoj